49a Jaro — N-ro 5a — Junio - Julio 1957a

BELGA ESPERANTISTO

Fondita en 1908a

Redaktoro-Administranto:
la Prezidanto de R.B.L.E.:
Maur. JAUMOTTE
Avenuo De Bruyn, 44
Wilrijk-Antverpeno

Oficiala monata Organo de
REĜA BELGA LIGO ESPERANTISTA
Asocio sen profita celo,
aliĝinta al UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

Abonprezo:
Fr. 100,-

Nia kvina Beneluksa Kongreso en Eindhoven

Kiel la prezidanto de Reĝa Belga Ligo Esperantista substrekis en sia malferma saluto al la kongreso, la Belgaj aliĝintoj, de kiam ili ekkonsciis, ke la Kongreso, tiun ĉi jaron, malfermiĝos je la 8a de junio, — tio estas la Sta Medardo, — senescepte, ektimis ke la Kongreso dronu sub la ĉielaj akvofaloj, ĉar Sta Medardo estas konsiderata en Belgujo, kiel cetere en Francujo, kiel senkompata pluvigemulo; iom kiel, por la nederlandanoj, Sta Margriet ankaŭ ŝajnas havi, laŭ popoldirajo, saman econ.

Kaj vidu: ekzakte je la 14a horo, kiam ekmalfermiĝis la akceptejo, ankaŭ malfermiĝis la ĉielaj kluzoj ... kaj falis, falegis, dum iomege da tempo, pluvego, kiu malebligis al la alvenintoj, eliri ĉu la stacidomon, ĉu eĉ sian propran aŭtmobilon!

Por la Kongresanoj, dise haltigataj tio daŭris laŭŝajne tre longtempe; sufiĉe longtempe ĉiuokaze por ke, ĉe l'oficiala horo, multaj ankoraŭ ne estu alvenintaj en la akceptejon.

La bonvenigo fare de la L.K.K. okazis tial kun iom da prokrasto; tamen sufiĉe frue por ke la L.K.K.-anoj kaj la prezidantaro de la diversaj Ligoj kaj instancoj havu ankoraŭ la tempon por subpluva promenado al la Urbdomo.

Akcepto en la Urbdomo

Pro la malvasteco de la akceptsalono, la Urbestraro ne estis povinta inviti ĉiujn kongresanojn kaj la urbestro, S-ro Van Rooij, tuj senkulpigis sin pro tio, en sia bonveniga parolado.

Li eldiris vere tre kuraĝigan pledon por nia idealo: Li efektive aludis tion, kio okazis kun la grandaj oficialaj lingvoj, kiuj ofte tre malfacile elspruĉis el la amaso da dialektoj, kiujn la popoloj daŭrigas uzi, flanke de la oficialigita lingvo: li citis ekzemplocele la Frizojn, kiuj parolas sian frizan dialekton kaj eklernas, pro nacia interkompreno, la nederlandan lingvon, kiel la Bretonanoj samcele lernas, flanke de sia bretona dialekto, la francan lingvon.

La Urbestro, — kiu ofte jam spertis la malfacilaĵojn de la internaciaj konferencoj, dum kiuj la uzo de telefonaparatoj devas anstataŭi la rektan aŭskultadon kaj komprenon, — esperas ke, iam ankaŭ ĉiuj popoloj, flanke de sia propra lingvo, faros la saman klopodon, — kun la celo de internacia interkompreniĝo, — kiun faras la malpli vastaj grupoj sur la nacia kampo.

Kaj ĉar tio estas fakte la idealo, kiun la esperantistoj klopodas efektivigi, li dezirs al la kvina Beneluksa Kongreso, plej sukcesan vivon.

S-ro Maur. Jaumotte petis de la urbestro la permeson traduki resume lian paroladon en esperanto, kaj S-ro Van Rooij poste konfirmis, ke li aŭskultis kun vera intereso tiun ĉi tradukon; ke li estis tre bone rimarkinta la fidelecon de la resumo kaj ke li miris, ĉar esperanto estas parolebla tiel flue.

Tio donis al S-ro Blokker, prezidanto de L.E.E.N., la okazon ne nur danki la urbestron pro la kora akcepto, sed ankaŭ gratuli lin pro la vera poresperanta parolado, kiun li faris. Li ankaŭ klarigis al la urbestro kiamaniere la esperantistoj, certe multnombraj, — tion pruvis la peticio al la U.N.O. —, tamen dissemitaj tra la tuta mondo, jam solvis por si mem la malfacilaĵon, tiel ke ilia idealismo estas, nun jam, plene rekompencata, ankaŭ sur la praktika kampo.

La urbestro tiam rondirigis la vinglasojn kaj toastis je la prospero de nia movado.

La tri Ligaj prezidantoj tiam prezentis al la urbestro la membrojn de siaj respektivaj estraroj.

Oficiala malfermo de la Kongreso

La pluvo intertempe estis ĉesinta kaj la oficialuloj reiris al la kongresejo, kie okazis, je la 19a, 30, la oficiala malfermo.

S-ro J. Mols, prezidanto de la L.K.K., unuavice bonvenigis la kongresanojn; faris kelkajn komunikojn kaj poste transdonis la parolvicon al S-ro Blokker, kiu oficiale malfermis la Kongreson kaj siavice bonvenigis la multnombrajn ĉeestantojn, kiuj plenigis la cetere belan kaj grandan salonon de la hotelo „Limburgia".

Li ankaŭ legis kelkajn salutleterojn, inter kiuj estas ĉefe citindaj, tiuj de D-ro P. Kempenters, pro-honora prezidanto de R.B.L.E. kaj de Profesoro Canuto, prezidanto de U.E.A.

Saman saluton alportis S-ro G. Debrouwere, prezidanto de Flandra Ligo Esperantista, kaj S-ro M. Jaumotte, prezidanto de R.B.L.E., kiu entuziasme diris sian ĝojon denove bani en tiu speciala atmosfero kiu regas en niaj kongresoj.

Poste F-ino M. Vermaas, direktorino de la U.E.A.-oficejo, salutis ankaŭ la kongreson nome de tiu ĉi oficejo kaj memorigis pri la festo de la 70-jara ekzisto de Esperanto.

Fine parolis ankoraŭ mallonge S-ro Smit, nome de la Kristana Ligo, kaj F-ino Burger, kiu faris alvokon por la kontraŭ-atombomba agado, kaj kiu disdonis tiucelan propagandilojn.

Interkona vespero

Tiam sekvis la tiel nomata „interkona vespero", enkondukita per tre trafa filmparto, kiu permesis al ĉiuj, tuj jam, ekkoni la escepte rapide vastiĝantan Eindhoven.

Tiu ĉi vespero tamen esence konsistis en granda balo.

Kaj baldaŭ la tuta salono pleniĝis

En la Akademio

Adres-Ŝanĝiĝo

La adreso de la Akademio de Esperanto kaj de ĝia prezidanto, S.ro Inĝ. J. R. G. Isbrucker estas nun: Wassenaarseweg 11c, Hago, Nederlando.

per la laŭtaj sonoj de la plej diversaj kaj viglaj dancarioj kaj la kongresanoj, ĝis la unua matene, trovis okazon interkonatiĝi aŭ rekonatiĝi, gaje dancante.

LA DIMANĈA TAGO

Matene okazis la tradiciaj Di-servoj, por la protestantoj en la salono „Elias", Willemstraat, kun S-ro W. Koopmans, kiel predikanto, kaj por la katolikoj en la kapelo de la Patroj Augustenanoj, Kanaalstraat, kun Pastro Rubertanus O.F.M. Cap., kiu celebris la Sanktan Meson kaj predikis en Esperanto.

Je la 10a horo precize, komenciĝis en la diversaj salonoj de la kongresejo, la apartaj kunvenoj de la tri ligoj, pri kiuj la respektivaj raportoj estas presataj sur alia paĝo de tiu ĉi sama numero.

Por tiuj, kiuj ne ĉeestas la kunvenojn, la L.K.K. organizis matene kaj posttagmeze promenadojn kaj vizitojn, al la urbo laŭlonge de la Philipsfabrikejoj kaj al la parko; kaj aliflanke, al la muzeo kaj al Animali.

Je la tagmeza horo, ĉiuj kongresanoj kunvenis sur la ŝtuparo de la „Van Abbe"-muzeo, kie okazis la komuna fotografado, tuj sekvata de la komuna tagmanĝo en „Limburgia".

Tiu tagmanĝo estis senceremonia kaj senparolada kaj tuj sekvata, por L.E.E.N., de la daŭrigo de la matenaj priparoloj; dum por la aliaj liganoj estis organizataj la jam cititaj vizitoj.

La dimanĉa vesperfesto.

Kaj por komuna panmanĝo multaj retrovis unu la alian je la 18a 30 en „Limburgia", kie estis komenciĝonta, je la 19a45, la dimanĉa vesperfesto, kiu konsistis en la prezentado de pliaj filmoj, por kies pruntedono kaj montrado, la L.K.K, ŝuldas kaj esprimis varman dankon al la gravaj Philipsfabrikejoj.

Ĉiuj amuze rigardis kaj interese sekvis la diversajn filmojn.

Poste estis la vico al la 1-a Kat. Akordeona kaj mandolina orkestro „Eĥo de l'Sudo" prezenti diversajn tre viglajn kaj tre belajn ariojn, sub la gvidado de dirigento A. Van Erp.

Vere tre granda estis la sukceso de tiu ĉi ampleksa grupo de gejunuloj, kiuj tre lerte ludas sian instrumenton kaj prezentas plej trafan kunludadon.

Saman sukceson akiris la jonglisto J. Vink, kiu prezentis esperantlingve siajn tre mirigajn numerojn, kun ludkartoj, diverskoloraj tukoj, tuboj, gazetoj, kaj likvaĵoj .

Dum la paŭzo, nia bona friza samideano, S. S. de Jong, kiu kuŝis sur lito en angulo, ĉe la malantaŭa parto de la salono, akordeone prezentis diversajn numerojn, kiuj estis longe aplaŭdataj.

Kaj fine okazis la diskonigo de la gajnintoj de la premioj en la granda loterio, por kiu ĉiuj estis akirintaj biletojn, dum la antaŭaj aranĝoj.

Estis — (kaj S-ro Oleffe, kiu kontrolis kun S-ro R. Jacobs, la operacion, atestis ke ĉio okazis en bona ordo) — S-ino R. Jacobs kiu estis eltirinta la diversajn numerojn gajnontajn, tiel ke S-ro Mols, povis io rapide citi tiujn numerojn kaj disdonigi la premiojn sen tro da tempoperdo.

Ni aldonu tie ĉi ke, inter la premioj, estis vere belaj kaj gravaj donacoj, kiuj certe kontentigis la gajnintojn.

Kaj je la 24a horo, disiris la ĉeestantaro, post kiam S-ro F. Weeke, la novelektita prezidanto de L.E.E.N. estis dankinta la L.K.K.-anojn senescepte pro la farita laboro. En la persono de S-ro Mols, la senlaca prezidanto, li gratulis kaj dankis ĉiujn ties kunlaborantojn.

S-ro Mols dankis pro tiuj ĉi gratulvortoj, sed tuj volis retransdoni ilin al siaj kunlaborantoj kaj speciale al la afabla sekretariino, S-ino F. J. Bos-de Pagter, al kiu li prezentis belan florkorbon, dum ĉiuj en la salono laŭte aplaŭdis.

LA LUNDA TAGO

Ekskurso al Oisterwijk kaj Rommeldam

Je la 8,30a, lunde matene, la kongresanoj forveturis per du grandaj aŭtobusoj kaj per deko da privataj veturiloj, per kiuj la posedantoj estis invitintaj keelkajn amikojn, kongresanojn, kunveturi.

Survoje okazis akcidento al unu el tiuj ĉi lastaj veturiloj kaj ni esprimas la esperon ke la gesamideanoj, kiuj estis iom vunditaj, jam plene resaniĝis kiam ni skribas tiujn ĉi liniojn.

La veturado iris tra belaj regionoj de Sud-Brabanto; tra erikejoj, kie oni haltis apud la Heidemeer; tra malnovaj vilaĝetoj kun tipaj dometoj; laŭlonge de la statuo honore al Pieter Breughel, antaŭ kiu oni ankaŭ haltis por aŭskulti esperantlingvan klarigon pri tiu granda pentristo de S-ro Van Heugten.

Je la tagmeza horo, oni alvenis en la restoracio arbara „Groot Speyck", kie atendis bonega brabanta panmanĝo, kun abundaj diversaj viandaĵoj, panspecoj, ovo, kaj laŭelektaj trinkaĵoj.

S-ro Maur. Jaumotte, — pro la fakto ke S-ro Weeke ne povis kunfari tiun ĉi ekskurson —, je la fino de tiu ĉi manĝo, eldiris sian koran dankon, nome de la tri estraroj kaj nome de ĉiuj partoprenintoj, pro la tri belaj, kune pasigitaj tagoj, al la tuta L.K.K., kiu, — (kiel estas presita en la kongresa libro) — konsistis, surloke, el S-ro J. Mols, prezidanto; S-ro F. J. Bos-de Pagter, sekretariino, S-ro J. F. J. Burghoorn, kasisto; S-ro J. Bos, komitatano; kaj S-ro A. W. Withoos, prizorganto de la gazetara servo; al kiuj la Ligoj aldonis siajn oficialajn reprentantojn: S-ro H. J. Blokker, F-ino J. Terrijn, S-ro H. Sielens, kaj S-ro E. de Wolf.

Al ĉiuj surlokaj anoj de la Komitato, aparte kaj kune, li esprimis ĉies dankemon pro la grava antaŭlaboro kaj ankaŭ pro la plena dediĉo dum la tri kongrestagoj mem.

Entuziasma estis la aplaŭdo, kiu audiĝis post tiuj ĉi paroloj.

S-ro Jaumotte tiam ankoraŭ komunikis ke, laŭ propono de R.B.L.E., Flandra Ligo kaj L.E.E.N. estis kunelektintaj la urbon Charleroi, kiel kongresurbon por nia 6a Beneluksa kongreso 1958.

Jam pli ol 30 samideanoj spontane aliĝis al tiu ĉi kongreso kaj li faris alvokon por ke ankaŭ la aliaj, kiuj certe kontentiĝis pro la tiuĉijara kongreso, enskribigu sin por la sekvonta.

Charleroi kuŝas sur rekta linio de Nederlando, (Roosendaal) al Antverpeno — Bruselo — Charleroi, tiel ke la nederlandaj kongresanoj, kiuj ne havos okazon por reviziti Belgujon dum la jaro 1958a povos eventuale kapti la okazon viziti la universalan ekspozicion de Bruselon, sur la returnvojo, dum la lunda tago.

Li tamen ne konsilas tiun viziton por tiuj, kiuj povas reveni prefere dum alia tago ol la pentekostaj festoj, kiam tre certe estos escepta alfluo. Tial la L.K.K. certe zorgos por ke la lundan tagon la amaso de la kongresanoj povu dediĉi al vizito de interesaĵo en la Karloreĝa regiono mem.

***

La vetero kiu estis belega kaj varma dum la tuta dimanĉa tago kaj ankaŭ dum la unua parto de la lunda, nun reiĝis pluva kaj la promenado en la arbaro, ĉirkaŭ la restoracio devis, pro ĝi, esti mallongigata ... Baldaŭ tamen la pluvo ĉesis kaj la ekskurso do povis esti daŭrigata al „Rommeldam", kie la vizitantoj admiris pli ol cent konstruaĵetojn, kun speciala nomo kaj tipa klarigo.

Tiuj ĉi rilatas al la tre konata amuza jurnal-strio, en kiu Ollie B. Bommel kaj Tom Poes, — kiujn ni cetere renkontis en la parko —, ludas gravan rolon !

Tiu ĉi strio de Maarten Toonder estas tre lerte revivigata en tiu ĉi ampleksa konstru-koleto, kiu interesis ĉiujn.

Kaj baldaŭ alvenis la momento de la reiro al Eindhoven por ĉiuj aŭtoĉaristoj, dum multaj aŭtomobilistoj, kiuj jam plialproksimiĝis de la Belga landlimo adiaŭis la aliajn, kiuj ankoraŭ, dum kelkaj mimentoj, rekuniris al „Limburgia", kie S-ro J. Mols oficiale fermis la 5an Beneluksan kongreson.

L. R.

La Ide' al la Lumo

(Apokrifa raporto pri la Eindhovena kongreso)

Kongreso estas festo
por nia kapa kesto
(sur „muroj milojaraj")
en kiu bildoj karaj
pri „sankta am' " atestas!
Per ĝi ni manifestas,
per ĝi ni rekontrolas
ĉu amik*(in)*oj molas
aŭ tre, tro maljuniĝas.
(Neniam aŭtuniĝas
por ni) Per ĝi ni celas
varmecon kaj muelas
la idealogrenon,
aspiras luman benon!

La beneluksa Kvina
por nia margarina
bongusta Esperanto,
konkuris en *Holando,*
sub *Filips-lampo* hela (1)
kun la butero de la
„brabanta panomanĝo"!
Nu, la kongresaranĝo
de Lokoko-geviroj
(nun pentekostmartiroj
modestaj) plensukcesis:
en ĝi eĉ ne necesis
akcepto en urbdomo
de nur la inda homo...

Sed *Filips* plie faris:
la sunon akaparis,
lumigis ĝin intense,
kvankam li mem enmense
(ĉar internacie famas)
nin nur varmete amas...
Do, post la pluvatakoj
sekiĝis ĉiuj flakoj (2)
kaj dum la suno brilis
...enĉambre multaj trilis.
„Disparoliĝis" *(seke?)*
Leen, ĝis ekstaris *Weeke,*
la nova *luma meĉo,*
sur prezidanta seĝo.

Sed lasu ni la ligojn
prizorgi la butikojn,
trinkadi el pokalo
de l'verda idealo
alvide al eterno; —
per *Diogen-lanterno*
algesti junularon
suriri l'pacaltaron...
Ni petu, kun insisto,
prefere al jonglisto
(la lerta Vink kapable
lumludis kandelabre)
suriri la podion
kaj veki l'iluzion...

Tagmanĝa serv' hiatis:
ni tamen plene satis.
Sed mi preferis balon
(Ŝvitigan idealon)
pensante pri *Babeloj*
dum klakis la oreloj
pro l'orkestreta bruo,
ĝis la...preskaŭa fruo.
Prefere al muzeo
...fermita, je la veo
de *Mols,* nia mentoro
senlaca, kaj fakt-oro
kun *Bos,* ĉiuj dankotoj,
eĉ pro...gajnantaj lotoj!

Lumurba propagando:
„la sesa urb' en lando!"
Eĉ troa lumkaskado
dum filmoprezentado
devigis por ni, strigoj,
al decaj mallumigoj.
Mi finu *(spacomanke)*
gratuladante danke
ankoraŭ, pro l'ekskurso
al *rommeldama* urso (3)
al *Breugel,* mia avo (4)
tra la pejzaĝa ravo,
kaj estas la konvinko
de mi *(antaŭ la drinko)* :

„Ja iuj nur kritikas, —
„sed laŭdo nur efikas!"

TYNEVERUM

1) aludas la konatajn Philips-fabrikojn. 2) pluvmarĉetoj. 3) fabelurbo en Oisterwijk. 4) naskiĝloka monumento de l'mondfama pentristo, de kiu devenas . . . la flandroj.

Dum la 41a Belga Kongreso

Solena Kunsido de R.B.L.E.

Dum la dimanĉa tago de nia 41a Belga Kongreso, kiu okazis dum la Pentekostaj tagoj, en Eindhoven, en la kadro de la 5a Beneluksa Kongreso, estis antaŭvidata la tradicia Solena Kunsido de R.B.L.E., kiu donas okazon al la ĉeestantaj membroj, fari kune rerigardon al la pasinta jaro.

Ĉe la estraro tablo eksidis S-ro Maur. Jaumotte, prezidanto, kaj S-ino J. Plyson kaj S-ro J. Soyeur, gevicprezidantoj; dum S-ro H. Sielens, kiu vojaĝas nunmomente en Usono, estas senkulpigita.

La Prezidanto bonvenigis ĉiujn kaj diris sian ĝojon, unufoje pli, havi la plezuron renkonti plej karajn samideanojn el diversaj urboj de la lando. Li deziris al ĉiuj plej agrablajn kongrestagojn.

Li tiam transdonis la parolvicon al S-ro Soyeur, kiu relegis la raporton jam prezentitan, la antaŭan monaton, dum la ĝenerala Jarkunsido, kiun multaj membroj malfeliĉe ne povis ĉeesti.

El tiu raporto evidentiĝas ke, — en la daŭro de unu jaro —, multaj aferoj estis pritraktataj de la Ligo, ĉu rekte, ĉu en kunlaboro kun la Grupoj

La jaro alportis al ni tre speciale gravajn funebrojn, pri kiuj memorigis la raporto kaj ankaŭ la prezidanto, kiu honorigis la malaperintojn per kelkaj trafaj vortoj.

Li poste sin turnis, per same koraj paroloj, al siaj plej apudaj kaj fegulaj kunlaborantoj, kiuj, en la kadro de la Ligo, estas ĉefe S-ro J. Soyeur, kiu, krom la kasisteco, ankaŭ prizorgas parton de la ĝenerala sekretarieco, por kies kroma efektivigo li ankaŭ dankis S-ron H. Sielens; kaj S-ino J. Plyson, kiu daŭrigas zorge flegi diversajn kasojn kaj tion faras je la plej granda profito de nia Ligo. Li ankaŭ citis speciale la nomon de S-ro G. Van den Bossche, sen kies ĉiutaga helpo la „Instituto" ne povus funkcii, kaj ankaŭ de S-ro H. Boffejon, kiu dum la jaro faris gravan klopodon, per la eldono de „Mondo"; kaj la ne-plena sukcesigo de tiu ĉi klopodo nenion deprenas de la valoro de la gesto kaj de la ago.

La Prezidanto ankaŭ gratulis la Grupojn, inter kiuj la plej malforta, tiu de Charleroi, nunmomente plej mirinde restariĝis kaj jam atingis nun la duobligon de sia membronombro por 1956.

Kaj al la prezidanto de la Bruĝa Grupo Esperantista, S-ro Ch. Poupeye, li transdonis, kun same varmaj gratuloj, la premion „Antoinette Jennen",

42-a Universala Kongreso de Esperanto

Marseille - 3—10 aŭgusto 1957 - Francujo

Adreso: 32, Cours Estienne d'Orves, Marseille, Francujo.
Telefonoj: PRado 55-46; FErréol 96-18.
Telegrafo: Esperanto.
Banko: James Rosa, Marseille.
Ĉirkonto: Groupe Esperantiste - Marseille n-ro 156-15.

Fervoja Rabato:

La Francaj Fervojoj donas rabaton de 20 % al la partoprenantoj en la 42-a Universala Kongreso de Esperanto. La rabato validas ek de la franca landlimo por la periodo inter la 29-a de julio kaj la 15-a de aŭgusto.

Automobilistoj:

La eksterlandaj aŭtomobilistoj ricevas en Francujo ĝis 25 litroj da benzino ĉiutage.

Antaŭkongresaj Manifestacioj:

La solaj antaŭkongresaj manifestacioj agnoskitaj de la Loka Kongresa Komitato estas:
— Kulturaj Internaciaj Ferioj: „La evoluo de l'civilizoj kaj la moderna socio"
Kastelo Grésillon de la 14-a ĝis la 24-a de julio 1957.
— Oficiala Antaŭkongreso en Parizo:
Palaco de UNESKO de la 31-a de julio ĝis la 2-a de aŭgusto
— 27-a Internacia Kongreso de la Blindaj Esperantistoj:
Liono de la 30-a de julio ĝis la 2-a de aŭgusto
— 13-a Internacia Junular-Kunveno:
Villeneuve-lés-Avignon de la 27-a de aŭgusto.

Oficiala Antaŭkongreso:

La prepara Komitato konsideras tri kategoriojn de Hoteloj:
1. prezo kun matenmanĝo 1.100 ĝis 1.350 Fr.
2. prezo kun matenmanĝo 800 ĝis 950 Fr.
3. prezo kun matenmanĝo 600 ĝis 750 Fr.

Adreso de la Loĝiga Servo: s-ro Jean Thierr, 26 rue Molière, Paris 1.

Kongresaj Sekcioj:

La Estraro de U.E.A. decidis, ke la Kongreso laboru en tri sekcioj:
UNUA SEKCIO: Esperanto en la Edukado (en kunlaboro kun ILEI). Prezidanto: s-ro D. Kennedy.
DUA SEKCIO: La Internacia Lingvo en Scienco kaj Tekniko (organizita de UEA kaj ISAE). Prezidanto: Prof. D-ro Ivo Lapenna.
TRIA SEKCIO: Esperanto en Komerco kaj Turismo. Prezidanto: S-ro P. Petit.

Statistiko:

(ĝis fino de aprilo) Alĝerio 4, Aŭstrujo 22, Aŭstralio 1, Belgujo 13, Brazilo 4, Britujo 67, Bulgarujo 23, Ĉeĥoslovakujo 5, Danlando 26, Finnlando 10, Francujo 343, Germanujo 91, Grekujo 1, Hispanujo 32, Hungarujo 2, Italujo 110, Izraelo 1, Jugoslavio 42, Japanujo 2, Kongo Belga 2, Maroko 14, Meksikio 2, Monaklando 3, Nederlando 41, Norvegujo 14, Novzelando 2, Pollando 7, Portugalujo 5, Rumanujo 2, Sudafriko 2, Svisujo 20, Svedujo 103, Turkujo 2, Usono 6, Venezuelo 1. Entute 1025 el 35 landoj.

Gian Carlo Fighiera
Konstanta Kongresa Sekretario.

Antaŭ-Kongreso en Parizo

(Internacia Konferenco de la Popol-Universitatoj)

Tiuj, kiuj en 1937 partoprenis la Internacian Konferencon „Esperanto en moderna vivo" certe memoras pri la organizo kaj la programo de tiu konferenco.

Tiun-ĉi jaron, en Parizo, oni aranĝos sensacian manifestacion kiel antaŭ-kongreson al la Universala en Marseille.

En la kadro de tiu antaŭ-kongreso, estos la unua internacia konferenco de la Popol-Universitatoj.

La antaŭ-kongreso kaj la konferenco havos kiel lokon la Palacon de Unesko mem, kaj la partoprenontoj de ambaŭ aranĝoj povos ĝui la diversajn allogajojn, kaj eĉ tagmeze kaj vespere manĝi en la restoracio de la Palaco de Unesko.

Mardon, la 30-an de Julio, la dejorantoj de la Esperantista Fervoja Asocio en Francujo akceptos la aliĝintojn ĉe ilia alveno en la diversaj stacidomoj de Parizo.

Merkredon, la 31-an de Julio,

la programo estos jena:

9a h. Solena malfermo de la konferenco kaj de la antaŭ-kongreso.

10a h. Parolado pri „Kion, unuflanke Unesko, aliflanke la Popol-Universitatoj, alportas al la internacia kompreniĝo?"

11a h. Laboroj de la tri komisionoj:

1a komisiono: Ĝenerala organizado. Difino de tio, kio devas esti Popol-Universitatoj. Disvastiĝado kaj eblecoj de la socio de eŭropa Popol-Universitatoj.

2a komisiono: Interrilatoj inter la Popol-Universitatoj kaj la neregistaraj asocioj, Unesko kaj Eŭropa Konsilantaro.

3a komisiono: Rilatoj inter la Popol-Universitatoj por plibonigado de la plenaĝula edukado: a) Lingva obstaklo, ekuzo de helpa lingvo; b) Korespondado inter membroj; c) Vojaĝoj al aliaj landoj, akcepto de delegitoj de P. U. fare de P. U. kaj de membroj ee P. U. fare de aliaj membroj.

(Je la 10a h. estos ankaŭ turisma vizito de la historiaj kvartaloj de Parizo, por tiuj, kiuj tion preferos).

14.30 Daŭrigo de la laboro de la komisionoj. (Vizito de la modernaj kvartaloj de Parizo por tiuj, kiuj ne deziros partopreni en tiuj laboroj).

19a h. Oficiala akcepto de la kongresanoj en Ministerio por Nacia Edukado.

22a h. Nokta vizito de Parizo.

Ĵaŭdon, la 1-an de Aŭgusto

9a h. Daŭrigo de la laboroj de la komisionoj.

10.30 Prelego pri „Rolo de internacia helplingvo por faciligi la popolan kulturon.

12a h. Oficiala akcepto en la Urbdomo de Parizo.

13.30 Tagmanĝo sur rivero Seine en ŝipeto.

15a h. Daŭrigo de la laboroj de la komisionoj.

17a h. Ferma kunsido. Aprobo de la raportoj.

20.45 Kabareda vespero senpage oferata al ĉiuj kongresanoj.

Vendredon, la 2-an de Aŭgusto

9.30 Foriro por la vizito de Versailles, la kastelo, la Trianonoj. Tagmanĝo en Versailles. Vizito de la kastelo de Valmaison.

Vespere, foriro al Marseille por la partoprenontoj de la Universala Kongreso.

Ni petas la esperantistojn, ke ili bonvolu tuj rilati kun la gvidantoj de la Popol-Universitatoj de siaj urboj aŭ regionoj, por ke ili venu Parizon. Plej bone estus, se la delegitoj al la konferenco de la Popol-Unversitatoj estus esperantistoj.

La diskutoj dum la konferenco povos okazi en la lingvoj angla, esperanta, franca, germana, sed la tradukoj okazos nur en Esperanto.

Tiu konferenco estos do la unua provo de la eblecoj de Esperanto por internaciaj konferencoj, kies roloj estu tute apartaj de la esperantista propagando.

Estu konsciaj pri la graveco de nia eksperimento. Nepre, helpu nin!

Por la Organiza komitato de la antaŭkongreso en Pariza kaj de la Unua Internacia Konferenco de la Popol-Universitatoj.

Pierre PETIT, Prezidanto

ĉar la grupo de Bruĝo brile gajnis tiun premion por la jaro 1956.

S-ro Poupeye dankis kaj promesis fari sian eblon por la konservo de sia nuna membraro kaj eĉ por ĝia daŭra plifortigo.

Fine S-ro M. Jaumotte honorigis la jubileantojn, kiuj meritas la Medalon de la Ligo pro 25jara membreco. Tiuj ĉi estas:

S-ro Henri Sielens (Antverpeno)
S-ino Julia Plyson (Bruselo)
F-ino Mathilde Kestens (Bruselo)
S-ino Suzanne Verbeke-Vandenberghe (Bruĝo)
S-ino M. J. Viane-Vandenberghe (Bruĝo)

kaj promesis alporti persone la medalojn al la jubileantoj, dum festa kunsido de iliaj respektivaj grupoj.

Ĉiuj de la prezidanto alportitaj laŭdoj estis varme aplaŭdataj de la ĉeestantoj.

Fine venis la du kromaj tradiciaj punktoj de la tagordo:

la starigo de la Honora Kolono por la 42a, kiu, laŭ propono de S-ro Jaumotte kaj post akordiĝo kun ambaŭ aliaj Ligoj, okazos en Charleroi kaj por kiu jam tuj enskribigis sin pli ol 30 gemembroj;

kaj la kolekto por Panjo la Kaso, kiu, malgraŭ la fakto ke la ĉeestantaro estas malpli granda ol en Gento, alportis al nia kasisto, preskaŭ same gravan sumon.

Kaj ambaŭ tiuj faktoj donis al la Prezidanto lastan okazon por danko kaj gratulo kaj por alvoko, jam de nun, al kunlaboro per nia propagando, al la plena sukcesigo de nia 42a Belga, 6a Beneluksa Kongreso, kiu cetere estos organizata en Charleroi, okaze de la ora jubileo de nia Karlorega Grupo Esperantista,

Morala Aliĝo al la U.K. en Marseille

La LKK kaj la KKS faris ĉion eblan, por ke la Universala Kongreso en Marseille estu labora, interesa, amuza kaj ĉiurilate alloga. La aprobita programo promesas vere altnivelan semajnon en plej agrabla atmosfero.

Malgraŭ tio, la nombro de aliĝintoj estas relative malgranda. Kvankam sendube multaj aliĝos en la lasta momento, tamen tute certe en Marseille ne estos tiom da kongresanoj, kion estis en Kopenhago. La kaŭzo verŝajne estas, ke la ĉi-jara kongresurbo situas iom fore. Konsiderante, ke tre probable multaj esperantistoj, kiuj ne povos persone ĉeestiĝ la kongreson, deziras tam ligiĝi kun la ĉefa jara manifestacio de la Esperanto-Movado, la Estraro de U.E.A., interkonsente kun la LKK, decidis enkonduki ĉi-jare specialan „Moralan Aliĝon" al la 42-a Universala Kongreso en Marseille. La kotizo por tiu-ĉi Morala Aliĝo estas 1.000 fr.fr. aŭ egalvaloro. La Morala aliĝo ne rajtigas al partopreno en la aranĝoj de la kongreso, sed ĉiu kiu pagos la kotizon de Morala Aliĝo ricevos la Kongresan Libron kaj ĉiujn aliajn dokumentojn.

La kotizon por la Morala Aliĝo oni povas pagi aŭ al la LKK per ĝirkonto Groupe Esperantiste, Marseille, N-ro 156-15, aŭ per la banko James Rosa, Marseille, aŭ al la kutimaj perantoj, kies adresoj estas publikigitaj en la oficialaj bultenoj. Kotizojn akceptas ankaŭ la Centra Oficejo de U.E.A., 7, Eendrachtsweg, Rotterdam-C.

La Estraro estas konvinkita, ke multaj esperantistoj utiligos tiun-ĉi eblecon kaj subtenos per Morala Aliĝo nian ĉi-jaran Kongreson, havigante samtempe al si belan kaj valoran memorajon.

Generala Sekretario de U.E.A.
Prof. D-ro Ivo Lapenna

Zamenhof-Monumento

STARIGOTA EN WIEN EN 1958.

La Magistrato de la urbo WIEN jam konsentas disponigon de loko por starigo de la Zamenhof-Monumento!

Nun Loka Komitato dissendas ĉi tiun cirkuleron kun la peto, ke la *Landaj Organizoj* publiklgu la alvokon en la Landa E-gazeto kaj instigu al kontribuo por la Monumento, ke la *Esp.-grupoj kaj kluboj* publikigu ĝin en siaj Bultenoj kaj cirkuleroj kaj persone varbu al kontribuo kaj ke la *unuopaj tsperantistoj* varbu inter sia gekonatularo kaj mem kontribuu. Eĉ la plej malgranda obolo estas bonvena!

La nomoj de ĉiuj donacintoj estas publikigataj en „Informilo de IEMW.

Kiu donacis almenaŭ 5 intern. poçtrespondkuponojn aŭ la egalvaloron, ricevos foton de la Monumento krome!

Kiu donacos almenaŭ 10 int. r.k. estos eternigata sur tabuloj en la Panteono, ricevos la foton kaj ankaŭ estis eternigata en la Dokumento pri la kreo de la Monumento, kiu estos enmurigata en la soklo de la Monumento!

Ĉiu inter vi varbu kaj kolektu monon ĉe viaj konatoj (ankaŭ ne-esperantistoj) kaj sendu de tempo al tempo al ni la liston kun la adresoj de la donacintoj.

La donacoj povos esti sendataj aŭ rekte al

„Internacia Esperanto-Muzeo
en Wien, I. Hofburg, Aŭstrio"

kun aldono „Zamenhof-Monumento" en simpla letero kun respondkuponoj aŭ vialanda bankbileto aŭ en nacia mono al la Reprezentanto de IEMW en via lando (vidu en „Informilo") aŭ al UEA en ROTTERDAM, Eendrachtsweg 7.

Ni fiksas jenajn premiojn:

a) por grupoj aŭ unuopuloj, kiuj donacis almenaŭ en la baloro de 50 resp.kup.
   1. premio: Katalogo de IEMW (ĉiuj 3 volumoj) almenaŭ pli ol 700 paĝoj
   2. premio: Katalogo de IEMW (volumoj 1 kaj 2) almenaŭ 500 paĝoj
   3. premio: Katalogo de IEMW (volume 1-a, 461 paĝoj)
   4-13 po unu Esperanto el la duoblajoj de la Muzeo
b) por grupoj kaj unuopuloj, kiuj kolektis kontribuojn de almenaŭ 50 resp.kup. la samaj premioj kiel sub a).

La disdonado de la premioj okazos laŭ la alteco de la kolektita aŭ donacita mono!

Europa Junulara Tendaro

Gejunuloj, la kultura sekcio de la RONDO DE LA NAĜANTOJ en MARMANDE (Lot et Garonne - Francujo) organizas tendaroj de junaj Eŭropeanoj.

CELO: Interfratigi la junularon de dekkvar landoj najbaraj de Francujo.

RIMEDOJ: Sportoj (speciale Naĝado), praktiko de lingvoj, diskoj, muziko, folkloraj manifestacioj, malaltprezaj ekskursoj al Lourdes, Pirineoj, Biarritz, Arcachon ktp.

KONDIĈOJ: Gejunuloj 16 ĝis 25-jaraj; dato kaj daŭro laŭ bonvolo de la partoprenanto; membrokarto kun akcidentasekuro, prezo 500 francaj frankoj; nutrado potaga: de 250 ĝis 400 francaj frankoj; se eble, kunporti tendon, se ne senpaga loĝigado.

Enskribiĝi kiel eble plej baldaŭ, skribante al *S-ro VARAILLON*, Stacidomo, Francujo, aldonante neuzitajn vialandajn poŝtmarkojn por la respondo.

La Esperantista grupo el tiu urbo, laŭlonge de la Rodano, nome „La Bona Stelo" organizas internacian amikan rondon de la 27a julio posttagmeze ĝis la 2a aŭgusto vespere. En tiu tempospaco vi ricevos plenan pensionon kun vino kaj loĝejon en komfortaj dormejoj kaj vi faros tri tuttagajn ekskursojn por la prezo de nur 8.000 francaj frankoj. La ekskursoj montros al vi la antaŭ Alpojn, Vercors, la romanan urbon Vaison, Nyons, la grotegojn de Orgnac kaj la belegan Rodanan valon.

Petu informojn pliajn ĉe „Bona Stelo" Rue Pêcherie 31, ROMANS (Drôme) France.

BELGA KRONIKO

Prezidanto: S-ro Maur. JAUMOTTE, De Bruynlaan, 44, Wilrijk.
Vicprezidanto-Kasisto: S-ro J. Soyeur, 91, Rue du Chêne, Seraing.
Vicprezidantino: S-ino J. Plyson, 185, rue Jourdan, Bruselo.
Generala Sekretario: S-ro H. Sielens, „Internacia Marista Domo", Falconrui, 21, Antverpeno.
(Poŝtĉeknumero: R.B.L.E.: 13.37.67)

ANTVERPENO

Esperanto-Grupo „La Verda Stelo"

(Poŝtĉeknumero 726.54)

La 19an de aprilo, Sankta Vendreda atmosfero estis kreata per tre konvena paroladeto de F-ino H. Hofkens, bele ilustrita per lumbildoj. S-ro Luc De Marré, vekis rimarkindan intereson per sia parolado pri la paskaj kutimoj kaj moroj en la diversaj landoj de la mondo. Per alloga lotumado, organizita de F-ino L. De Winter, la kunveno estis konkludata en tre agrabla sfero.

La 26an, S-ro H. Vermuyten faris tre humorplenan paroladon pri „Urbopurigado kaj Higieno tra la Jarmiloj". La amaso de la nekutimaj sciindajoj multe amuzis la aŭskultantojn. La sukceso estis tiom granda ke, dum la sekvonta kunsido, la 3an de majo, la paroladisto devis daŭrigi sian ampleksan raporton, kiun li ilustris per belaj lumbildoj. La Prez. S-ro Maur. Jaumotte same humorplene dankis la paroladiston kaj plue donis la okazon al S-ro Luc De Marré raporti pri kongreso en Luksemburgo, kiu rilatis al la Eŭropa Movado kaj al kiu li partoprenis kiel delegito de la antverpena sekcio de tiu movado.

La 10an: „Paljoĉjo", radiofona teatraĵo, laŭ fabela origino, estis disaŭdigata. Al ĝi brile kunlaboris: F-inoj M. Ameryckx, E. De Coene, Cl. Peeters; S-roj J. Montmirail, J. Vinck kaj J. Verstraeten. Por kompletigi la vesperon, S-ro Luc De Marré flegis sian astrologian rubrikon.

La 17an la debatvespero „Tramoj aŭ aŭtobusoj en la urbo" donis la okazon al la kritikemuloj por konigi sian opinion pri tiu aktuala problemo. Vigla debato ekestis kiun la Prezidanto S-ro Maur. Jaumotte konkludis je ĉies kontenteco.

La 24an, amuza vespero estis organizata al kiu S-ro P. Peelman partoprenis per kantoj de li tradukitaj kaj per poeziajoj de li deklamitaj, sed verkitaj de S-ro A. Lodema (nederlanda samideano); F-ino Cl. Peeters lin lerte akompanis ĉe la piano. S-ro Schellekens, sentoplene prelegis kelkajn belajn poeziajojn kaj, kune kun S-ro J. Verstraeten, prezentis malgrandan skeĉon. Kelkaj aliaj membroj: S-roj J. Montmirail, Luc De Marré kaj P. Thaey kompletigis la vesperon per amuzaj ludoj.

La 31an, S-ro H. Boffejon, helpata de du kolegoj, prezentis dokumentajn filmojn, afable pruntedonitaj de la aŭtomobila asocio „Ford". La ĉeestantoj travivis kelkajn agrablajn horojn kaj same kiel la dankvortoj de la Prezidanto la varma aplaŭdo esprimis la agnoskecon de la publiko.

Programo de la venontaj kunsidoj:

Ĉiuvendrede „Witte Leeuw", Frankrijklei 4, je la 20a horo (1a etaĝo).

Julio: La 5an: Parolata Ĵurnalo; la 12an: Debatvespero; la 19an: Promenado tra Malnova Antverpeno gvidota de S-ro E. Paesmans. Kunveno je la 20a h. sur la Verda Placo; la 26an: Leksikona Vespero.

Aŭgusto: La 2an: Parolata Ĵurnalo; la 9an: Amuza Vespero; la 16an: Antverpena Kermeso, NE KUNVENO; la 23an: Raportoj pri la Universala Kongreso de Marseille; la 30an: Libertempaj raportoj.

BRUĜO

Bruĝa Crupo Esperantista

(Poŝtĉeknumero 4835.33)

Dum la kunveno de la 23a de aprilo, post la leciono de la elementa kurso, S-ro Ch. Poupeye paroladis pri la temo: „La Monda Homo".

La dua parto de la kunveno de la 30a de aprilo estis dediĉata al raportado pri la ĝenerala kunveno de RBLE en Bruselo, 27.4.57 kaj al legado de B.E.

Raportado pri la kermesa foiro okazigis viglan interparoladon dum la kunveno de la 7a de majo.

Plia numero de la „Parolata Gazeto" aperis la 14an de majo, kun kontribuoj de S-ro Vuylsteke pri „Viro eltirata el kanalo" F-ino Y Poupeye pri „Kloroformo", F-ino G. Wybouw pri „Diversaj Popolkostumoj", S-ino G. Poupeye pri „Anglaj Humorajoj", kaj S-ro Ch. Poupeye pri „La fonografo estas okdekjara".

Dum la kunveno de la 21a de majo, S-ro R. Behaeghel gvidis esperantajn konkursojn, kiajn li jam sukcese organizis en la grupa sekcio de St-Michiels. La 28an de majo estis denove S-ro R. Behaeghel, kiu kaptis la atenton de la ĉeestantoj per tre dokumentita parolado pri „Astronomio".

Vizito de Ges-roj. Helmuth el San Diego, Kalifornio, Usono, agrabligis la kunvenon de la 4a de junio. S-ro Helmuth interesplene rakontis pri sia vojaĝo de San Diego al New Orleans, de tie al Rotterdam kaj sekve al la ĉefaj Eŭropaj landoj. Post

G. FAES
16, Schoenmarkt, 16
ANTVERPENO
Por via MUZIKO
RADIO kaj GRAMOFONO

kelkaj tagoj de restado en Bruĝo, Ges-roj. Helmuth daŭrigis sian vojaĝon al la Beneluksa kongreso de Eindhoven, al kiu partoprenas naŭ geĝrupanoj.

Ankaŭ en la grupa sekcio de Sint-Michiels okazis lunde 13an kaj 20an de majo interesaj perfektigaj kunvenoj sub gvidado de S-ro R. Behaegel.

Programo de la venontaj kunsidoj:

Ĉiumarde, je la 8a vespere, **en la somera kunvenejo** „CONCORDIA", Zuidzandstraat 5, (Tel. 366.24).

Julio: 2an: Legado de B.E.; 9an: Libertempaj proponoj; 16an: Parolata gazeto; 23an: Esperantaj konkursoj sub gvidado de S-ro R. Behaeghel; 30an: Muzika vespero.

Gratuloj:

Al F-ino Marguerite BARTHOLOME, membrino de la Bruĝa Grupo, kiu edziniĝis la 23an de aprilo kun S-ro Guido VUYLSTEKE, kiu de tiam alĝis al la grupo.

BRUSELO

Esperantista Brusela Grupo

(Poŝtĉeknumero 12.30.48)

La 25an de Marto, S-ro Jacobs laŭtlegis la historion de la Antverpena grupo „La Verda Stelo", verkitan de S-ro Sielens.

Tiel ĉiu povis ekkoni la glorojn kaj dolorojn de la grava Esperanto-grupo de la lando kaj konscii pri la diversaj konsiderindaj roloj, kiujn ludis niaj tiel bone konanataj Antverpenaj amikoj en tiu grupo. Post la legado, S-ro van der Stempel dankis kaj aplaŭdigis S-ron Jacobs.

La 1an de Aprilo, anstataŭ la parolata ĵurnalo, la komitato, tute surprize (kvazaŭ April ŝerco!), laborigis la grupanojn. Ili devis kunmeti la amasojn da folioj por la 200 broŝuroj pri la grupa historio!

Dimanĉon, la 7an de Aprilo, ni inde festis nian oran jubileon.

La 8an de Aprilo S-ino Lecat el Antverpeno prelegis pri Einstein.

El du libroj, verkitaj de Einstein mem, S-ino Lecat ĉerpis liajn filozofiajn koncepojn rilate al la deviga militservo, al la socia rolo de la homa individuo kaj al la religio.

LES ENTREPRISES
DERKS
226, Rogierstrato, BRUSELO
Tel.: 15.19.92
Entrepreno de
KONSTRUAĴOJ

Kiel brila oratorino, ŝi scipovis ekkapti kaj subteni, dum tuta horo, la plenan atenton de aŭdantaro, kiu de la unua ĝis la lasta minuto, streĉe aŭskultis! La prezidanto fervore dankis.

La 15an de Aprilo, la perfektiga kurso de S-ro van der Stempel pritraktis samaspektajn vortojn: intence, intense; rezoni, resoni; ĝusta, justa, jus kaj aliaj. Poste, oni konversaciis pri „La Kuirejo".

La 29an de Aprilo, S-ro Jirousek, proponis kaj majstre gvidis diversajn ŝerludojn, per kiuj li sukcesis amuzi kaj senĉese ridigi la ĉeestantojn. Meritita aplaŭdoj rekompencis lin.

La 6an de Majo, S-ro van den Bossche el Antverpeno honorigis nin per siaj ĉeesto kaj interesa partopreno al nia parolata ĵurnalo. La plej grandaj poentonombroj estis atribuataj al la tradukita teksto: „Blinda Knabino reakiris la Vidokapablon" de S-ro van der Stempel kaj al la legita teksto „Rakonteto ĉe Sankta Petro" de F-ino R. Huysmans; Kiel pridiskutotan temon, oni elektis: „Superstiĉo", memverkitan de S-ro Schumacher.

La 13an de Majo, S-ino R. Jacobs faris sian unuan, sed vere rimarkindan paroladon pri „La Dormo". Ŝi sinsekve pritraktis la multajn aspektojn de la problemo de la dormo, kiamaniere kaj kiom longe dormi?, historion de la lito, la sonĝojn la dormigilojn.

Post entuziasmaj aplaŭdoj, S-ro Castel gvidis debaton pri tiu temo.

La 20an de Majo, S-ro van der Stempel, dum sia perfektiga kurso, instruis pri „rekta komplemento kaj atributo"; „nominativo aŭ akuzativo post la konjunkcio: **kiel**". La konversacio precipe temis pri „La salono kaj la manĝoĉambro".

La 27an, S-ino Stern aranĝis amuzvesperon: Ŝi komencis la rakontadon de kriminalhistorio, kiun la aŭskultantoj devis lauvice komoletigi. Kaj poste, ŝi aŭdigis diskojn, kies titolojn, aŭtorojn, ktp., la ĉeestantoj devis eltrovi. Viglaj aplaŭdoj rekompencis la gvidintinon de tiu gaja vespero.

La 3an de junio, vizitis la grupon G-roj Helmut, el Kalifornio. S-ro Helmut rakontis pri sia rondvojaĝo en Eŭropo kaj partoprenis la parolatan ĵurnalon, en kiu akiris plej grandan poento-nombron: S-ro Castel kaj F-ino Huysmans, dum estis elektita por diskuto „Kulturo kaj Tehniko en Francujo" de S-ro van der Stempel.

La 17an, kvin kursanoj de S-ino Weyn kaj du de S-ro Jurousek sukcesis la elementan ekzamenon, nome F-ino S. Huysmans, kun 96,5 p. kaj S-roj Dubois (91.5 p.), Nanquette (88,5 p.); Wuydts (80,5 p.), Stroobants (80 p.), Baudour (77 p.) kaj De Saeger (60 p.) Ĉiuj kandidatoj estis laŭvice entuziasme aplaŭdataj.

Programo de la venontaj kunvenoj: ĉiulunde, je la 20a h., en „BRASSERIE DE LA JUSTICE" (1a etaĝo), 38, place du Grand Sablon, Bruselo 1a; Tel. 12.64.76.

Julio: La 1an: Parolata ĵurnalo; la 8an: Komuna legado; la 15an: Tradukvespero; la 22an: Amuza vespero, gvidota de S-ino STERN; la 29an: Diskutvespero: „La kisoj" de F-ino HUYSMANS.

Aŭgusto: La 5an: Parolata ĵurnalo; la 12an: Komuna legado; la 19an: Perfektiga kurso de S-ro van der STEMPEL; la 26an: Amuza vespero, gvidota de S-ino STERN.

Septembro: La 2an: Parolata ĵurnalo; la 9an: „Nia vojaĝo al Sicilio" de S-inoj PLYSON kaj OBOZINSKI; la 16an: Perfektiga kurso de S-ro van der STEMPEL; la 23an: Parolado kun lumbildoj de la Liga Prezidanto, S-ro Maur. Jaumotte, kiu donos siajn impresojn pri „Vojaĝo en Hispanujo" kaj samtempe disdonos la medalojn al la grupaj jubileantoj.

la 30an: Diskutvespero.

CHARLEROI

Karloreĝa Grupo Esperantista

La 7-an de majo la Grupo starigis, kun la Poliglota Klubo de Karloreĝo, komision celante la Beneluksan Kongreson de 1958.

La unua kunveno de tiu Komisio okazos la 12-an de junio.

La 14-an kaj 21-an okazis la kutimaj semajnaj kunvenoj, kun kurso kaj distrajoj.

La 25-an speciala kunveno okaze de vizito de S.ro Ivan Zekof, bulgara samideano.

La 28-an la grupanoj kaj iliaj geamikoj estis invitataj ĉeesti prelegon pri Orientaj Landoj, por propagando. Grafo de Cuyper, prezidanto de la Grupo, faris ĝin franclingve. La preleganto, kiu plurjare vivis en Azio, entuziasmigis siajn aŭskultantojn per sia agrabla parolado, li montris diversajn regionajn vestojn kaj objektojn, multajn personajn fotografaĵojn; li aŭdigis per diskoj kelkajn originalajn kantojn de tiuj landoj.

Pro la kontenteco de la ĉeestintoj, oni faros aliajn samajn vesperojn tuj post la somera libertempo.

Esperanto en la Aviado

En la revuo „International Aviation Review" aperis esperantlingva artikolo en la numero 21 de la sesa jarkolekto en aprilo 1957. (Eldonejo Flugrevuo AG, Bern, Transitfach 1434). Germanlingva titolo ESPERANTO IM FLUGWESEN kaj indiko pri la enhavo montras al la legantoj, pri kio temas. Ĉar la enhavo povas ankaŭ interesi Esperantan publikon pro tio ke la temo ankoraŭ nenie estis pritraktita resume, ni represas ĉi tie la plej gravan parton el ĝi forlasante nur la lastan paragrafon, kiu havas la titolon „Esperanto en internaciaj organizoj" kaj kiu indikas i.s. la adreson de UEA. Jen la teksto:

La telekomunikiloj kaj la aviado interproksimigas la popolojn kiel neniam antaŭe. Pli kaj pli urĝe sentiĝas la bezono de instrumento, kiu venkas ankaŭ la lingvajn barilojn, kiuj ankoraŭ estas same altaj kiel en la tempo antaŭ la eltrovo de la elektro kaj de la motoroj. La aparato, kiu supergrimpas ĉi tiujn obstaklojn, jam ekzistas: ĝi estas Esperanto, kreita en 1887 kaj evoluiĝinta al moderna transportilo por informoj kaj ideoj dum sia eventoriĉa historio. Se ĝi hodiaŭ eniras unuafoje en ĉi tiun Internacian Aviadan Revuon, ĝi prenas la lokon, kiu estas konforma al ĝia rolo.

La internacia lingvo jam ludas rolon en la aviado, ĉar ĝi estas uzata por la propagando de la diversaj flugsocietoj en la vasta publiko. La unua flugsocieto kiu utiligis Esperanton por sia propagando estis la norda SAS; ĝi jam eldonis antaŭ kelkaj jaroj tre plaĉan multpaĝan prospekton pri siaj servoj. Sekvis KLM, kiu publikigis 1952 sespaĝan prospekton sur malgranda formato priskribanta siajn historion kaj servon. Depost la Univer-

Verreries et Miroiterie DESMECHT & C°
LA LOUVIERE S.P.R.L. **Tel. n-roj 223.01 - 225.37**
Du esperantaj markoj:
TABULO, por lernejtabuloj; **KATOKULO**, por signalvitroj.

2-a Internacia Infana Kongreseto

Kongresejo:

La knabin-lernejo en Rue de Turenne, je 500 m. de la Kongresejo de la Universala Kongreso.

Generalaj Informoj:

La Kongreseto estas rezervita al infanoj de 6 ĝis 13 jaroj, kiuj povas kompreni kaj paroli Esperanton kun samaĝuloj. Ĝi okupos la etulojn dum la tago: la gepatroj devos akompani ilin matene je la 8-a h. kaj kunpreni ilin vespere je la 20-a h. Por la gepatroj kiuj deziros tion, speciala aŭtomobila servo de la Universala Kongreso ĉiumatene akompanos la infanoj al la kongresejo ek de la loĝloko.

Datoj:

La Kongreseto malfermiĝos sabaton la 3-a de aŭgusto je la 8-a h. kaj fermiĝos vendredon la 9-a de aŭgusto je la 20-a dimanĉon la 3-a, la Kongreseto ne funkcios matene, sed ek de la 14-ah.

Kondiĉoj:

La aliĝkotizo estas fiksita en 3.000 Fr. Ĝi inkluzivas ĉiujn servojn kaj programojn de la Infan-Kongreseto, nome, matenmanĝojn, du ĉefmanĝojn, posttagmezan manĝeton, ekskursojn, amuzajojn. La Kongreseto akceptos senpage ĝis du esperantistaj infanoj el familioj en nebonstataj cirkonstancoj. La Infana Kongreseto okazas dank' al financa subteno de la Universala Kongreso.

---

sala Kongreso de Esperanto en München en 1951 fariĝis kutimo, ke la flugsocietoj speciale propagandis por la uzo de siaj aeroplanoj okaze de la kongresanoj al la esperantistaj mondkongresoj. Aperis 1955 por la kongreso en Bologna tiaj prospektoj de BEA/BOAC, KLM, Swissair, kaj por la Universala Kongreso, kiu okazis 1956 en Kopenhago presiĝis propagandiloj de BEA/BOAC, SAS kaj Swissair. La brita prospekto estas tre simpla, sed tiu de la Skandinava Aer-Sistemo estas grafike tre lerte farita kun malmulte da teksto presita per grandaj literoj kun la slogano „Flugu per SAS kaj estu unu travivajon pli riĉa". La nova prospekto de Swissair estas la plej zorge farita; ĝi estas: presita en tri koloroj kaj enhavas ankaŭ tutpaĝan bildon el Kopenhago kaj sciigojn pri la urbo. La reklamteksto estas jena: „Swissair estas la Svisa Aertrafika Kompanio. El ĉiuj partoj de la mondo ĝi flugas kun modernaj kaj plej modernaj aparatoj tra Zürich al Kopenhago. Foje je la bordo de Swissair-aeroplano vi estas senzorga kaj dorlotita kaj vi ĝuas la konatan svisan gastamon." Por la Universala Kongreso okazonta en aŭgusto 1957 en Marseille Air-France jus eldonis tre belan prospekton.

La nomitaj prospektoj estas kune kun la kongresaj dokumentoj sendataj al ĉiuj aliĝintoj de la Universalaj Kongresoj de Esperanto.

Ni ne dubas ke estonte la flugsocietoj en ankoraŭ pli granda mezuro utiligos Esperanton por sia propagando. Ili en tiu rilato povas sekvi la rekomendon de la fervojoj. Inter tiuj la germana federacia fervojo (Deutsche Bundesbahn) plej vaste uzas Esperanton eldoninte jam du prospektojn kaj presante la klarigojn en sia horaro en Esperanto. Ankaŭ la svisa Lötschberg-fervoje (BLS) eldonis en 1955 deksespaĝan tre bele ilustritan prospekton; kaj post ĝia rapida elĉerpiĝo BLS en 1957 jus denove uzis Esperanton por alia prospekto. Per la citado de unuopaj urboj kaj turismaj centroj, kiuj jam eldonis prospektojn en Esperanto, ni povus plenigi paĝo;n; tial ni devas rezigni pri tio nun.

LISTO DE LA MEMBROJ-KOMERCISTOJ

Antverpeno

G. Faes, Schoenmarkt 16. Antverpeno. Muziko, Radio, Diskoj.
„In 't Duifken" (S-ano Paesmans), Lge Koepoortstr. 64: Kostumoj (5 0/0 rab.)
Vino Max Bolsius, Diepestraat 58-60, Antverpeno: Kuirejilaro. Tel. 32.57.85
M. Philips, Karel Rogierstr. 1, Antverpeno. Korsetoj - Rab. 5-10% por la membroj.
P. van der Hoydonck-van den Buys, Kapelsesteenweg 549, St. Mariaburg. Ŝuoj — Teksajoj — Mercerajoj. Tel. 74.27.86
J. Montmirail, Kortemarktstraat 53, Berchem. Arĥitekto. Tel. 39.58.66
Morris de Ketelaere, Oostenstraat 25, Antverpeno. Ĥemiajoj. Tel. 39.17.09
S-ino Henny Jacques-de Ketelaere, Beeldekensstr. 31, Antverpeno. Gramofonaj diskoj por meminstruado. Tel. 33.75.38
Roger Jaumotte, Cyriel Buysscstr. 44, Antv. Anoncoj en tagjurnaloj. Tel. 37.47.14
K. Amerijckx, Melgesdreef 40, Merksem. Centra Hejtado. Tel. 45.81.07
R. De Soete-Vanistendael, Dambruggestraat 234, Antv. Okulvitroj — Rab. 5 0/0
CL. Peeters, Onderwijsstraat 68, Antverpeno. Apotekejo. Tel. 35.40.67
Firmo van Iseghem & Verstraeten, St. Bernardse steenweg 631, Hoboken. Vitrajoj — Speguloj — Tel. 37.88.20
J. van Nereaux, Sterstraat 1, Antverpeno. Viandisto. Tel. 39.55.81
H. Peeters, Vordensteistr. 58, Schoten. Inĝen.: Neon-lumo, Reklamoj. T. 81.48.47
H. Jacques, Lange Beeldekensstraat 31, Antverpeno. Presajoj. Tel. 33.75.38
Verdijck, St. Rochusstraat 174, Deurne. Ĉiaj asekuroj kaj hipotekoj. Tel. 39.06.07
P. Peelman, Volkstraat 34, Antverpeno. Fumajoj — Pantofloj. Tel. 37.62.55
Y. Ameryckx, Pr. Leopoldstraat, Borgerhout. Peltajoj
A. van den Neste, Deurnebaan 30, Merksem. Presad-inkoj. Tel. 45.78.59
J. Van Hoof, Marialei 7, Antw. - Pentraj-entreprenoj Tel. 39.35.33

Bruĝo

Marcel Poupeye, Elf Julistr. 32. Ĉiaj asekuroj en la tuta lando. Tel. 371.93
Charcuterie Strovi, Vlamingstr. 48 (Teatroplaco) Viandvaroj. Tel. 334.08
Maison Joye, Gelmuntstr. 29. Ĉemizoj, Gantoj, Kravatoj. Tel. 332.75
Firmo G. Verbeke, spinolarei 19: Konstrumaterialoj. Specialaĵo: naturŝtono de Jura. Tel. 321.85
Pan- kaj Kukbakisto R. ROSSEEL, Mariastraat 30, Konsumsalono. Tel. 338.34

Bruselo

M. Jirousek, 104 rue du Téléphone; reklamoj kaj litertipoj 18.77.67
Farmaciisto Jacobs, 94, rue général Eenens Bruxelles 3 15.26.01
Farmaciisto N. Nelis, Meise 59.13.73
„BONBONS SWINNE", 77, rue de Nieuwenhove 44.57.36
Imprimerie Lielens, 18, rue de la Princesse 21.10.98
CARRELAGES „Carrart", 19, avenue de Saxe 21.74.49
Viajn MEBLOJN ĉe S-ro Weyn, aĉetu rue Destouvelles, 57 15.96.97
Libroj, Publikajoj, jurnaloj, F-ino Kestens 24, rue Bodenbroeck 11.71.03
Tinkturejo, senmakuligejo „TEX" 11, Av. du Couronnement, Woluwe St. Lambert 70.75.82

KOMERCISTOJ kiuj senkoste propagandas por Esperanto per reklamoj en siaj butikoj

G. Baeten, Belpairestraat 53, Berchem. Tel. 39.22.81. Frizisto por sinjorinoj
„De Boerinekens" (Clem. Van Hassel). Estro de la trinkejo en la Flandra Operdomo
A. Roels, Montignystraat 155, Antverpeno. Ledaj artikloj-Selisto. Tel. 37.14.07
G. Goemaere, P. Genardstraat 39, Antverpeno. Speciejo, laktejo
Vandersmissen, Kampioenstr. 11, Antverpeno. Paperajoj, parfumajoj
Librejo Schuttershof, Schuttershofstr. 36, Antv.: luo, aĉeto, vendo de libroj
Vojaĝ-agentejo Pier Busseti, Hopland 5, Antv.: privataj kaj grupvojaĝoj